10a. Jaro No 5 (113) VERSCHIJNT MAANDELIJKS NOVEMBRO 1938

FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA ESPERANTO MOVADO

N.E.L.E. (Nia Estas La Esperanto) Flandra Esperantista Grupo

ENHAVO:

1. POR PURA LINGVA EVOLUO.— 2. KOMUNIKOJ DE LA ESTRARO.— 3. OFICEJO "ESPERANTO ĈE LA INSTRUADO" 4. IRLANDA LINGVO EN AMERIKO.— 5. RESUMOJ EN ESPERANTO.— 6. VI.— 7. MIAJ REVOJ.— 8. MIAJ PENSOJ. 9. ESPERANTISTA LINGVA KOMITATO AKADEMIO.— 10 BIBLIOGRAFIO.— 11. INTER NI.— 12. ANGULO DE LA SERĈEMULOJ.

Orgaan van den

VLAAMSCHEN ESPERANTISTENBOND

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA.
(Vlaamsche Esperantisten - Bond)

HOOFDBESTUUR :
Voorzitter : H. Rainson, Steenweg op Hombeek 54, Mechelen.
Ondervoorzitter : E. Cortvriendt, P. van Humbeekstr. 3, Brussel-W.
Sekretaris : G. Debrouwere, Magdalenastr. 29, Kortrijk Tel. 1654.
Penningmeester : A. De Keijzer, Vlaamsche Steenweg 70, Brussel.

DIENSTEN :

Tentoonstellingsmateriaal : G. De Boes, Wijnstraat 81, Ronse.
Grupkonsilanto : A. De Troeyer, Vrijheid 98, Arendonk.
Kursusen : H. Rainson, Stw. op Hombeek 54, Mechelen.
Voordrachten : A. Ackaert, Frankenstraat 3, Brussel.
Pers : G. Debrouwere, Magdalenastr. 29, Kortrijk.

AFDEELINGEN TE : SEKCIOJ EN :

Aalst, Aarschot, Alveringem, Antwerpen, Anzegem, Arendonk, Avelgem, Beersse, Berlaar, Bertem, Blankenberge, Bornem, Breedene, Brugge, Brussel, Deinze, Denderleeuw, Diest, Diksmuide, Erembodegem, Gavere, Gent, Harelbeke, Heist op-den-Berg, Heist op-den Berg (Goor), Herenthout, Kasterlee, Koekelare, Kontich, Kortemark, Kortrijk, Kuurne, Langemark, Lebbeke, Leuven, Lichtervelde, Mechelen, Meenen, Merchtem, Meulebeke, Middelkerke, Mol, Nederbrakel, Ninove, Oostende, Oostmalle, Oudenaarde, Oud-Turnhout, Poperingen, Putte, Puurs, Ravels, Roeselare, Ronse, Staden, St Amands, Tervueren, Tielt (W. Vl.), Tienen, Torhout, Turnhout, Veurne, Vichte, Vilvoorde, Vlamertinge, Waregem, Wervik, Wetteren, Wevelgem, Willebroek, Wilsele, Wingene, Woumen, Zottegem, Zwevegem.

VERTEGENWOORDIGERS TE :
REPREZENTANTOJ EN :

Assche (Brab.), Hamme (Oost Vl.), Mortsel, Munkzwalm, St. Truiden.

ORGAAN :

« Flandra Esperantisto » verschijnt maandelijks.
Redaktie : Ten Eeckhovelei 125, Deurne-Noord (Antwerpen).
Kopij : uiterlijk 15-en ieder maand bij de redaktie.
Administratie : Vlaamsche Steenweg 70, Brussel.
Advertenties : barema op aanvraag.

LIDMAATSCHAP :

Leden-abonnenten : fr. 25 's jaars.
Eenvoudige leden : fr. 5 's jaars.

POSTREKENING :
2321.50 van Flandra Ligo Esperantista, Brussel.

Flandraj Esperantistoj, via organizo estas :

Flandra Ligo Esperantista!

10a-Jaro - No 5 (113) Novembro 1938

FLANDRA ESPERANTISTO

ORGANO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

REDAKCIO: Ten Eeckhovelei 125 Deurne - Noord Antwerpen. | ADMINISTRACIO: Vlaamsche Stw., 70 Brussel P. K. : 2321.50 de Fl. L. E

Jara kotiz-abono Fr. 25 APERAS MONATE

Por pura lingva Evoluo.

Esperanto egala al naciaj lingvoj ?

Ekzistas esperantistoj, kiuj — kompreneble bonintence — ne ĉesas disdiri, ke Esperanto estas ĉiurilate egala al naciaj lingvoj. vero iliaj vortoj malbone efikas internen, t.e. sur la kvalito de la Dirante tion, ili kredas servi al la lingvo propagandacele, sed en lingvo mem.

Sendube Esperanto estas almenaŭ egalvalora al — eble eĉ pli valora ol — la lingvoj naciaj ; sed per ĉiaj ajn argumentoj oni ne kapablas forrezoni la fakton, ke ĝi estas lingvo artefarita kaj ne senbride kaj ĥaose kreskinta.

La artefariteco de Esperanto elmontriĝas diversrilate. En la kadro de tiu ĉi artikolo ni priparolu nur unu tian fakton, kiu konstante influas malbone nian literaturan lingvon :

Ni scias, ke pere de Esperanto multaj homoj sukcesas riĉigi la propran menson, akirante en spirita regiono kapablojn, kiujn ili sen Esperanto eble neniam akirus. Ni scias ekzemple, ke ekzistas personoj, kiuj kapablas fari longajn paroladojn en Esperanto, sed ne en sia lingvo nacia. Aliaj verkas aŭ tradukas artikolojn, eĉ librojn en Esperanto(n), sed antaŭ sia esperantistiĝo neniam eĉ nur pensis pri tia agado en la propra lingvo. Ankoraŭ aliaj verkas poemojn en Esperanto, argumentante, ke Esperanto estas lingvo speciala favora al poemfarado, sed en la propra lingvo ili ne sukcesas kuneglui poemeton.

Ĉu efektive la scio pri Esperanto dotis tiajn homojn per tiaj talentoj ? Ne, nepre ne ! Esperanto povas riĉigi la menson, akrigi la spiriton, plibonigi kapablojn, sed ne donacas kvalitojn, tiom malpli talentojn. La kaŭzo de tio, kion oni preskaŭ ĉiutage povas konstati ĉe tiom multaj esperantistoj, ne estas talentoj iliaj, sed

— bedaŭrinda kaj maldolĉa vero ! — multrilata fuŝado pri la lingvo.

Imagu, ke la rapidlanga parolanto faras sian paroladon anstataŭ en Esperanto en sia propra lingvo, sed kun precize la samaj kvalitoj, bonaj kaj malbonaj ! Imagu, ke la lerta tradukemulo donacas al ni libron tradukitan en nia propra lingvo, sed kun precize la samaj stilaj kaj gramatikaj eraroj ! Fine imagu, ke la rapidpluma poeto regalas nin per poemoj nialingvaj anstataŭ Esperantaj, sed kun precize la samaj strange disĵetitaj vortoj, kvazaŭrimaĵoj, akcentmodifoj k.s. Ĉu tiuokaze la parolanto, la tradukinto kaj la poeto ne farus sin publike ridindaj ?

« Sen ia dubo ! » oni respondos al ni, « sed ĝuste en Esperanto tiuj homoj lertigis sin, kaj ĝuste Esperanto estas lingvo speciale taŭga por tia sinlertigado ».

Tamen ne ; en kaj per Esperanto oni povas disvolvi siajn kapablojn kaj talentojn, sed, ne posedante ian talenton, oni ne sukcesas krei ĝin nur per Esperanto, eĉ ne, sciante la lingvon dum tuta vivo. Kiu ne kapablas oratori, verki, traduki aŭ fari poemojn en la propra lingvo, neniam sukcesos fari ion tian en Esperanto, ĉar neniu povas fariĝi lerta esperantisto, tute ignorante la gepatran lingvon, kiun oni ĉiutage uzadas. Kaj neniu povas evolui en Esperanto, ne iagrade evoluante ankaŭ en sia nacia lingvo. Kaj se efektive oni prezentas al ni verkojn originalajn aŭ tradukitajn kaj poemojn kreitajn de tiaj homoj nespertaj en la gepatraj lingvoj, ni estu certaj, ke en iliaj plumproduktoj svarmas eraroj.

Jen la danĝera diferenco inter Esperanto kaj la lingvoj naciaj: en ĉiu nacia lingvo ĉiu iom instruita homo tuj rimarkas la erarojn, ĉar la fiksitaj lingvaj reguloj malpermesas, ke oni peku kontraŭ ili. Kaj se iaokaze ne ordonas regulo, ekzistas ankaŭ kutimoj, postulantaj obeadon. Kontraŭe en Esperanto la eraroj ne tiom facile rimarkiĝas, unue por tio, ke la granda amaso da esperantistoj konsistas ankoraŭ el studantoj ne kapablaj juĝi pri korekteco aŭ erareco ; due, ĉar malgraŭ sia logikeco la Esperantaj lingvaj reguloj estas tiom elastaj kaj lasas ankoraŭ tiom da libero, ke oni povas diversmaniere klarigi al si iajn gramatikaĵojn, pro kio kreskis pri iaj aferoj pli malpli diferencaj personaj opinioj ; kaj trie, pluraj esperantistoj, precipe en la lastaj jaroj, pli malpli ignoras la logikon, enkondukante en la lingvon tiujn ecojn el la gepatraj lingvoj, kiuj aŭ speciale plaĉas al ili, aŭ kiujn ili pro nesufiĉa scio pri Esp. ne kapablas eviti en sia uzado. El ĉio ĉi rezultas grava danĝero minacanta la liberan evoluon de Esperanto, ĉar laŭ tia procedo Esperanto akiros iujn mallogikajn, nekonsekvencajn kaj komplikitajn ecojn, kiujn iam posedas ĉiuj naciaj lingvoj kune. Se oni efektive volas rigardi Esperanton almenaŭ egalvalora al la naciaj lingvoj, oni ne apliku al ĝi naciajn lingvajn regulojn aŭ kutimojn, nek kiel studanto juĝu kvazaŭ spertulo ; sed oni komprenu, ke Esp. devas evolui ne laŭ spiritoj de arbitraj naciaj lingvoj, sed laŭ propra spirito Esperanta !

Literatura Komitato,

Adreso : G. J. Degenkamp, Rietstraat 40, Utrecht, Nederlando.

ESTRARKUNVENO okazis en Brussel la 23-an de okt. Por ekvilibri la financojn de la Kursa Centro, la estraro decidis subvencii tiun servon per 3.334,45 fr. La membrokartoj por la jaro 1939 dorsflanke surhavos kalendareton. Ligkunveno okazos en Brussel, dimanĉon la 11-an de dec. ; la tagordon ni aperigos en la venontan numeron. Proponoj por tiu tagordo devas atingi, *kun la necesaj klarigoj*, la ĝeneralan sekretarion tutlaste la 15-an de nov. Okazis ideinterŝanĝo pri « Flandra Studanto » eldonota ek de januaro, pri Jarlibro de Fl. L. E. aperonta en marto kaj pri eventuala starigo de ekzamena komisiono.

KURSA CENTRO. *Raporto financa pri la kurssezono 37-38 :*

Enspezoj :	
Pagoj de kursistoj	57.325,50
Subvencio Fl. L. E.	3.334,45
	Fr. 60.659,45
Elspezoj :	
Pagoj al instruistoj	44.307,00
Presaĵoj	9.079,80
Lokaj organizkostoj	5.935,85
Div. kostoj de la Centro	1.337,30
	Frs. 60.659,95

LIBRO-LOTERIO F. E. I. — Ni petas la atenton de ĉiuj legantoj por la tria kovertpaĝo kie estas trovebla la listo de nia dua granda libro-loterio. Ni kalkulas je la fervoro de la sekciestraroj por la disvendo de multaj biletoj. Ju pli rapide disvendiĝos la biletoj, despli baldaŭ okazos la tirado !

NOVAJ SERVOJ. — Sekcio Kortrijk provizore prizorgos la *gazetservon* de Fl. L. E. Tiukoncerne niaj sekcioj ricevis unuan komunikon. Konsciante la gravecon de tiu bona propagandmetodo, ni esperas ke ĉiuj niaj sekcioj konscience kunlaboros laŭ la donitaj instrukcioj. Adreso de la prizorganto : Magdalenastr. 29, Kortrijk.

Por helpi al niaj sekcioj kiuj deziras pliinteresigi la grupvesperojn, ni starigis *servon de prelegistoj*. Prizorganto estas : A. Ackaert, Frankenstr. 3, Brussel. Ĝis nun sin anoncis 12 samideanoj kiuj pretas paroladi en E. por niaj sekcioj pri entute 25 temoj. Ni estas konvinkitaj ke niaj sekcioj akurate uzos la helpon de tiuj bonvolemaj liganoj. Detalojn ni havigis per n° 6 de « Komunikoj ». *Atentu :* la servo de prelegistoj volonte ricevus propo-

nojn de samideanoj kiuj pretas paroladi propagandcele en *nederlanda lingvo* pri E.

NIA LIGA FLAGO. — Ni ankoraŭfoje atentigas niajn sekciojn, ke ni volonte ricevus donacojn por nia liga flago, inaŭgurota dum nia venontjara jubilea kongreso en Antwerpen. Ni precipe atendas malavaran geston de tiuj el niaj sekcioj kiuj ĝis nun ne helpis al la kolektado de la necesaj financaj rimedoj !

OFICEJO " ESPERANTO ĈE LA INSTRUADO".

(C. Krusemanstr. 43-3, Amsterdam-Z. Nederland)

Alvoko al la tutmonda gesamideanaro.

Gesamideanoj,

Ni, nederlandaj esperantistoj, staras antaŭ grava okazontaĵo..... !

En la monatoj novembro aŭ decembro nia regna deputitaro (dua ĉambro de la parlamento) pritraktos novan leĝon pri la edukado de geinstruistoj kaj la budĝeton de la instrua ministro ! Nia oficejo decidis aranĝi antaŭ ĉi tiu pritraktado :

Nacian Kongreson por Esperanto en la lernejoj, kiu okazos en *Hago,* la 5-an de novembro, je la 15-a horo en granda salono.

Jam antaŭ kelkaj monatoj deputitaro de nia oficejo priparolis niajn dezirojn kun la direktoro ĝenerala por la instruo. La skriba pritraktado de la nomita leĝo jam okazis, la ministra vidpunkto ne *estis* favora al nia afero. Sed la buŝa ankoraŭ okazos kaj ni deziras influi la finan decidon. La situacio ne estas senesperiga, ĉar sufiĉe grava parto de la deputitaro certe subtenos nin. Estos nia tasko ŝanĝi tiun parton en plimulton.

Nia oficejo, kiu reprezentas proks. 89000 personojn, invitos al la kongreso : la ministron, la direktoron ĝeneralan, ĉiujn deputitojn, la regnan instru-konsilantaron, la ŝtatajn inspektorojn, skabenojn de grandaj urboj, ktp. Kvar eminentaj parolontoj estas petataj, enkonduki la temon laŭ propra gusto. Ni, nederlandaj esperantistoj, zorgos plenigi eĉ la plej grandan salonon. Sed al vi, *eksterlandaj geamikoj,* ni alvokas :

« *Sendu simpati-esprimojn multenombrajn, poŝtkarte, letere, telegrame, unuopajn kaj kolektivajn ! !* Sendu ilin al la oficeja adreso (supre !)

Ni montros en la kongreso la rezultaton de ĉi tiu unuura alvoko por konvinki la aŭtoritatulojn same kiel la ceteran publikon, ke nia devizo : « *Esperanto en la lernejojn* » same vivegas en- kaj eksterlande.

Kun samideanaj salutoj

P. W. Baas (prezidanto).

Irlanda Lingvo en Ameriko.

Ni legis interesan artikolon en flandra gazeto pri tiu temo. « Granda intereso ekzistas por la decido de la Nev-Jorka urbestraro, kaj instruad-administracio pri la enkonduko de la lernado de la Irlanda lingvo en la lernejojn de tiu mondurbo, kaj la Universitato de Wisconsin okazigas kurson pri Irlanda lingvo, historio kaj literaturo.

Profesoro Patrick F. Flood, estro de la instruado de klasikaj lingvoj en la Theodoro Roosevelt- kaj Washington Irving altlernejoj, pruvas la neceson de tiu instruado sekve : La Irlanda lingvo, la antikva Gaŭla lingvo, restis vivanta lingvo, malgraŭ tri-cent jaroj da subpremo, moko kaj eĉ leĝa malpermeso.

Tiu lingvo, kune kun la Greka lingvo, estas la pli maljuna de Eŭropo kaj estis kun la greka lingvo, unu el la du pli grandaj iloj de civilizacio en la pratempo. (Neniam ni, flandroj, povas forgesi, ke Menapoj, Nervoj, Aduatikoj, Eburonoj, k.t.p. estis herooj kaj parolis la Gaŭlan lingvon, ke niaj riveroj kaj montaroj havis Keltaj-Gaŭlaj nomojn, kaj ke en nia lingvo multaj riĉaj vortoj ne estas klarigeblaj ol per la Gaŭla lingvo).

La Keltaj kaj Gaŭlaj lingvoj ekzistis multajn jarojn antaŭ la Germanaj kiel civilizacilingvoj. La Keltoj parolis ĝin antaŭ ol Virgilius kantis kaj multe pli frue ol kiam Cicero estis fama oratoro en Romo. La enkonduko de tiuj kursoj estas tre malfrua rekono de la popolsento de la Irlanda lingvo, kiel unu el la plej gravaj de la mondlingvoj. Dro. Patrick Flood bedaŭris la grandan eraran opinion en Ameriko pri la Gaŭla lingvo, kie ĝi estis rekonata nur kiel dialekton, barbaran kamparanlingvon, kvankam ĝi estas unu el la kvar lingvoj de la homaro.

La Irlanda lingvo estos nun instruata kiel ĝi vere estas ; civilizacia kaj gepatra lingvo, naskiĝinta el la sama radiko el kiu la tuta Kelta familio naskiĝis. Ĝi estas parolata de la Skotaj, Weŝaj, Cornwalŝaj kaj Bretonaj popoloj. Miloj (ja miloj mi diras) da Keltaj manuskriptoj estas nun kolektitaj ka enordigitaj de la Dublina urbestraro, manuskriptoj kiuj alportas novan klarigon pri la historio de la Eŭropa civilizacio.

Alia vidpunkto kaj utilo estas la fakto ke multe estos pli facile klarigebla en la Angla lingvo, de kiu centoj da vortoj estas el Irlanda deveno (La saman ni povus diri pri la antikva flandra lingvo).

La tuta nacia heredaĵo de la Irlandanoj en ifia lando kaj de la Irlandanoj, disvastigataj super la tuta mondo, kuŝas kiel enfermita en relikvujo en la Gaŭla lingvo.

Tio estas la opinio de tiu fama lingvisto kaj ni, flandroj estas dankaj pro la fakto ke pasintan jaron, la Universitato de Gent inaŭguris kurson pri Gaŭla lingvo. Kiel ofte ne diris Profesoro Vercouillie pri iu vorto « Deveno nekonata » tie kie la Gaŭla lingvo tiel rekte estus klariganta la profundan filosofian arton de unu jam de longe forgesita vorto.

Se tio povus veriĝi, tiam vortoj, ofte uzataj eĉ de Vondel,

sed nun kondamnitaj, estos denove en honoro kaj anstataŭos la novaĵojn Amsterdamajn, kiuj estos por ĉiam for el nia riĉa lingvo.

Keltamiko,

Esperantigis H. Van Durme.

Resumoj en Esperanto.

Unu el la plej bonaj propagandrimedoj por Esperanto en intelektulaj rondoj konsistas en la iniciato alprenita de jam pluraj nacilingvaj fakperiodaĵoj : aldoni al siaj ĉefaj artikoloj pli malpli ampleksan resumon en la internacia helplingvo. Tiu ĉi diskreta kaj, pro sia reguleco, insista altrudo nesenteble sugestas al la legantoj kreskantan komprenemon pri la utileco de Esperanto kaj iom post iom vekas aktivan intereson pri ĝi — ĉefe se multobliĝos tiuj mutaj varbadoj en kiel eble plej multaj gazetoj kaj revuoj.

Alia tereno por simila agado troviĝas en la multflanka scienca faklibraro, kiu ĝis nun estis preskaŭ tute neglektita por ĉi tiu celo. Por plenegi tiun mankon ni kreis Bibliografian Servon per Esperanto, celante precipe la franclingvajn regionojn, kiu funkcias proksimume laŭ la jena principo :

Ni petas al scienca verkisto aŭ al lia eldonisto franclingvan resumon pri verko kiun li nuntempe preparas, aŭ kiu aperis antaŭ nelonge ;

Tiun resumon ni zorge tradukas en Esperanton kaj, laŭ reciproka interkonsento, aŭ rekte resendas ĝin al la aŭtoro, aŭ akceptas mendon presigi ĝin ĉe unu el niaj presistoj, je la laŭnecesa libroformato. Se la libro jam estis presita, la resumoj estos gluotaj kiel aldonaĵo en la tutan kvanton de la restantaj, vendotaj ekzempleroj ;

Ni invitas la aŭtoron sendi recenz-ekzemplerojn al la ĉefaj Esperanto-periodaĵoj, kies adresojn ni tiucele konigas al li ;

Dank' al la Esperanto-resumo la verko estos konigata per recenz-artikolo al la tutmonda esperantistaro. Interesitaj samideanoj konantaj aŭ ne la originallingvon de la libro facile kaj rapide povos havigi ekzempleron al si, kaj ĝi estos valora pruvo pri la praktika utilebleco de nia lingvo ;

Aktivaj samideanoj el ĉiuj landoj, kiel eble spertaj en la scienca fakliteraturo, estas petataj redakti en siaj respektivaj naciaj lingvoj mallongan informon pri la koncerna libro (karakterizita per sia Esperanto-resumo !) kaj sendi ĝin, kun publikig-peto, al la tiurilataj fakrevuoj de sia lando. Per tiu rimedo la verkaĵo estos rapide diskonigata tra la tuta mondo, kaj la ofta mencio de Esperanto agos kiel valora propagandfaktoro por nia movado. (Noto : Estas konsilinde krei reton de konstantaj kunlaborantoj seriozaj, kaj ni petas agemajn samideanojn el ĉiuj mondpartoj sendi siajn adresojn al Servo Bibliografia Scienca per Esperanto, 11 rue Poupin, Metz-Montigny, Franclando.)

Ni sendis al la plej gravaj Parizaj eldonejoj kaj konataj francaj sciencfakaj verkistoj detalan cirkuleron pri la organizo de nia

Servo, kaj ni estas ricevintaj aron da promesplenaj respondoj kaj jam plurajn mendojn por resumo-tradukoj. La unua libro, kiun ni prezentos laŭ la dirita maniero, estos la grava verko de L. Elbe : La moralkrizo antaŭ la moderna scienco.

Estus dezirinde ke en aliaj landoj, precipe en malgrandaj (komparu : « Ĉu Esperanto servas al malgrandaj popoloj ? » en Heroldo n-ro 964 !) ekfunkciu similaj bibliografiaj servoj kiuj, in terrilatante, povus reciproke kunlaboradi kaj interkonsiliĝi.

Esperanto helpu al la scienca faklibro, la scienca faklibro helpu al Esperanto — jen estas nia devizo !

Albert Lienhardt.

P.S. — La subskribinto petas bv. sendi al li la titolojn, kun nomoj de aŭtoroj kaj adresoj de eldonistoj, de nacilingvaj verkoj kiuj estas ĝis nun publikigitaj kun resumo en Esperanto.

VI.

(laŭ Annie Salomons).

Vi estas la plej bela flor'
El la ĝarden' de mia kor',
Kaj kie vi' l piedojn metas
La suno brilas kaj ridetas.
Por mi l' imago de'l ĉiel',
Pli dolĉa ol abelmiel
Ja estus rericevi tuŝon
De viaj lipoj sur la buŝon.

Je via rava ekaper',
La tero, ŝajne senesper'
Estiĝas gaja kaj pli bela
Kaj tuj dolĉa kaj pli hela ;
La mond' en malavara tremp'
Baniĝas pompe en printemp'.
Vi estas mia sola ĝojo
Sur mia griza vivovojo.

Post kiam vi kun okulum'
Foriras, venas la mallum'.
Mi ploras kaj la kor' doloras
Por tiu kiun mi adoras.
Mi retroviĝas en dezert' ;
Groteske dancas en koncert'
Nur ombroj ; kaj de la amoro,
Turmente, restas... nur memoro.

F. V. Dorno.

Miaj Revoj.

Jen lasta malfortaĵo : revoj miaj.
Pri Vi, okulo via, via voĉ'
Svebante super mia dormo, oh! senbriaj !
Svarmante ĉirkaŭ mi en nokta loĝ'

Ne povas mi rezigni tiun ĉi riĉecon
Malliberigi min el tiu sorĉa fort'
Kaj kion mi forĵetas tage, maleblecon,
Ja ofte nokte estas mia dolĉa sort'

Ne volas esti Vi dum viv' karulo,
Vi estu mia revkarulo, Vi !
Dum nokto mi adoras Vin fervore :

Ne timas mi pro nigra vivnebulo
(Eĉ se amarĉagrena estas ĝi,)
Se sonas via ama voĉ' nokthore.

Pol. Van der Poel.

Miaj Pensoj.

(laŭ Annie Salomons).

De miaj pensoj birdoj
Reflugis ĉiam for
Kaj gaje tuj revenis
De la amanta kor'

De miaj pensoj birdoj
Kun dolĉa, eta kri'
Eĉ sciis dum la revoj
La vojon nur la li.

Ho, malfeliĉaj birdoj
Vi vagos kien nun ?
Nur restos al vi flugi
Laŭ vojo de mallum'

Murmur' de birdoj miaj
Ja restas amsopir'
Sed pensobirdoj mortos
Malsataj pro dezir'.

Pol. Van der Poel.

Esperantista Lingva Komitato Akademio.

I. LISTO DE DIFINOJ DE VORTELEMENTOJ.

Kiel mi jam anoncis en la 13-a numero de « Oficialaj Sciigoj de la Akademio » (Oktobro 1937), la Akademio entreprenas la starigon de listo de la difinoj de la vortelementoj de Esperanto. La procedo estos la jena : Unua listo de 100 vortelementoj de la « Universala Vortaro » kaj de ĝiaj 6 « Oficialaj Aldonoj », kiun mi kunmetis post interkonsiliĝo kun S-ro W. Bailey, Direktoro de la Sekcio por la Komuna Vortaro, estas sendata kun ĉi tiu bulteno kiel « Publika Propono » al ĉiuj Akademi-anoj kaj LK-anoj kaj al ĉiuj Esperantaj gazetoj kun la peto represigi ĝin. Mi invitas ĉiujn Esperantistojn sendi al mi, se eble antaŭ la 15-a de Majo 1938, siajn rimarkojn, korektojn, kritikojn, proponojn k.t.p. pri la apartaj difinoj de la listo, prefere por ĉiu vortelemento sur aparta slipo. Oni povas proponi korektojn, modifojn de la difinoj por igi ilin pli klaraj, aldonajn signifojn k.t.p. Mi speciale petas la helpon de fakuloj, precipe de botanikistoj kaj zoologistoj, por kritiki la latinajn nomojn, kiujn mi aldonis al la nomoj de plantoj kaj bestoj por difini ilin tute precize.

Post la pristudo de la envenintaj rimarkoj mi pretigos novan liston, kiun ricevos nur la Akademianoj. Ili voĉdonos pri ĉiu difino aparte. Poste la listo de la akceptitaj difinoj estos submetata al la Lingva Komitato por definitiva aprobo.

Post ĉiu vortelemento estas notitaj inter krampoj unu aŭ kelkaj literoj por fiksi ĝian gramatikan karakteron. La signifoj de la mallongigoj estas : s = substantivo, a = adjektivo, v ;= verbo, v tr = verbo transitiva, v ntr = verbo netransitiva, n = neŭtrala. Plue (fig) signifas : figure uzate.

Ir. J. R. G. Isbrücker.

1. -a (a)	=	1. unua litero de la alfabeto ; 2. finaĵo de la adjektivo aŭ de adjektiva pronomo aŭ numeralo, signifanta: a. kiu havas econ, b. kiu rilatas al.
2. abat' (s)	=	estro de monaĥejo.
3. abdik' (v tr)	=	formale demeti ĉiujn rajtojn je la trono aŭ je altranga ofico.
4. abel' (s)	=	insekto el la subklaso de himenopteroj, kiu produktas mielon (Apis).
5. abi' (s)	=	arbo el la familio de koniferoj (Abies).
6. abism' (s)	=	1. loko kun profunde malproksima fundo, kun krutaj flankoj ; 2. (fig.) nemezureble granda grado de mizero aŭ nesiado.
7. abiturient' (s)	=	mezgranda lernanto, kiu finis la gimnazian kursaron kaj sukcese plenumis la koncernan ekzamenon.
8. ablativ' (s)	=	kazo de la deklinacio en diversaj lingvoj, kiu esprimas instrumenton aŭ de-

venon.

9. abnegaci' (s) = forlaso de propraj komfortaĵoj kaj ĝuoj por la bono de aliaj.

10. abomen' (s) = sento, kaŭzata de tre malagrablaj ecoj de persono aŭ objekto.

11. abon' (v tr) = mendi per antaŭpago por difinita tempo gazeton, fervojbiletojn k.s.

12. abort' (v tr) = naski antaŭtempe nevivipovan idon.

13. abrikot' (s) = frukto de arbo el la familio de rozacoj (Prunus Armeniaca).

14. abrupt' (a) = 1. tre kruta, kvazaŭ fortranĉita ;
2. malagrable, neatendite subita.

15. absces' (s) = amaso de puso en histoj.

16. absint' (s) = 1. forta, verda likvoro, preparita el la samnoma vegetaĵo ;
2. aroma vegetaĵo el la familio de kompozitoj (Artemisia Absinthium).

17. absolut' (a) = 1. tute sendependa de ĉia povo aŭ kontrolo ;
2. kies aŭtoritato estas despota, aŭtokrata ;
3. senkondiĉa, nerelativa ;
4. senmiksa, ĥemie pura ;
5. gramatike nedependa de la entenanta frazo.

18. absorb' (v tr) = 1. tute okupi la spiriton aŭ la atenton de iu ;
2. tute enpreni en si kaj ne redoni.

19. abstin' (v ntr) = sin deteni, pro principo, de la uzado de alkoholo, tabako k. t. p.

20. abstrakt' (a) = 1. estanta neperceptebla de la sentoj, malkonkreta ;
2. konsiderata aparte de la tuto, al kiu ĝi apartenas.

21. absurd' (a) = kontraŭa al la komuna logiko, prudento aŭ scio.

22. abund' (a) = estanta en granda kvanto aŭ nombro, pli ol sufiĉa.

23. acer' (s) = arbo el la familio de aceracoj (Acer).

24. aĉet' (v tr) = akiri la posedrajton de io per pago de mono.

25. acid' (a) = havanta akran guston kiel vinagro aŭ citrono.

26. -aĉ' (n) = sufikso, esprimanta malbonecon, malbonan kvaliton, malŝaton.

27. -ad' (v) = 1. sufikso, esprimanta agon aŭ staton, kiam ĝi sekvas neverban radikon ;
2. sufikso, esprimanta daŭran aŭ ripetatan agon aŭ staton, kiam ĝi sekvas verban radikon.

28. adapt' (v tr) = konformigi por specialaj celoj aŭ kondiĉoj.

29. adept' (s) = 1. ano de doktrino aŭ sekto ;
2. persono, konanta arton aŭ sciencon kaj sin okupanta per ĝi.

30. adiaŭ (n) = saluta vorto, uzata ĉe la foriro aŭ disiĝo.

31. adici' (v tr) = per aritmetika operacio difini la sumon de kelke da nombroj aŭ kvantoj.

32. adjektiv' (s) = vorto, aldonata al substantivo por esprimi kvaliton.

33. adjutant' (s) = oficiro, konstante akompananta sian ĉefon kaj komunikanta liajn ordonojn al la subuloj.

34. administr' (v tr) = prizorgi la funkciadon, precipe financan, de organizaĵo aŭ entrepreno.

35. administraci' (s) = 1. administrantaro ;
2. administrejo ;
3. administrado.

36. admir' (v tr) = rigardi kun sento de honoro, estimo, ŝato, respekto.

37. admiral' (s) = ĉefo de milita ŝiparo.

38. admiralitat' (s) = 1. estraro de ŝiparo ;
2. oficejo de la estraro de ŝiparo.

39. admon' (v tr) = instigi per vortoj al la plenumo de devo.

40. adopt' (v tr) = 1. alpreni per oficiala, laŭleĝa akto iun kiel sian propran infanon ;
2. alproprigi al si iun spiritan posedaĵon, opinion, manieron.

(Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol redakcio, administracio aŭ Flandra Esperanto-Instituto, estos ignorataj).

DE TUTMONDA PERFORTO AL TUTMONDA FRATECO — *de G. F. Wates. Tradukita el la Angla originalo de W. Bailey, L. K. 128 paĝoj.* Tole bindita 3 ŝilingoj 6 pencoj. Aĉetebla ĉe ĉiu Esperantista Librovendisto aŭ ĉe Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo.

Eldonis : *The Esperanto Publishing Company, Ltd., Anglujo.*

Tiuj, kiuj en 1936 legis la el la angla tradukitan verkon de Georg Frederick Wates, « Progresado kaj la Pasinteco », certe volos legi la ĵus de la sama aŭtoro aperintan « De tutmonda Perforto al tutmonda Frateco »-n.

La aŭtoro Wates estas unu el la tre malmultaj verkistoj, kiuj

kapablas skribe rakonti tion, kion ili volas diri, kaj laŭ tia maniero, ke ĉiu povas kompreni liajn argumentojn.

Samspecaj temoj ofte ŝajnas tedaj por laikoj, pro la fakto ke ne ĉiu interesiĝas pri filozofiaj problemoj. Sed Wates, per siaj multnombraj historiaj anekdotoj, agrable rakontitaj laŭ aŭtentikaj dokumentoj, kaptas nian plenan atenton kaj nin tenas kateniitaj ĝis la fino : oni legas lian libron « en unu spiro ».

Precipe por Esperantistoj lia verko estas tre konsilinda, ĉar Wates estas homo en la plej vasta senco de la vorto, li estas la idealisto, kiu ne timas rigardi la malbonaĵojn rekte en la vizaĝon. Li laŭbezone malkonstruas por tuj rekonstrui ion pli bonan en la sama loko.

En tiu-ĉi malgranda libro, li pritraktas tre vastan temon kaj pruvas ke en ĉiuj tempoj la perforto malhelpis la liberan esprimadon de opinioj ; ke la riĉeco kaj la regado de oficiala aŭtoritato ĉiam obstrukcas la progresadon. Toleremo kaj frateco estas, laŭ Wates, la solaj rimedoj kontraŭ la haoso de la nuntempa mondo.

Ni varme rekomendas al niaj membroj la legadon de tiu-ĉi tre interesa libro, en perfektstila traduko de la en Esperantujo tre bone konata William Bailey.

La libro, belaspekte bindita, estas havebla ĉe Flandra Esperanto-Instituto, je la malalta prezo de ..... frj.

PRINCINO DE MARSO. — *de Edgar Rice Burroughs, tradukita el la Usona originalo de K. R. C. Sturmer. N-ro 4 de la* « EPOKO » *Libro-Klubo. 192 paĝoj.* Prezo por membroj de la Libro-Klubo estas unu angla ŝilingo plus afranko ; por ne-membroj, du ŝilingoj plus afranko.

Oni povas aliĝi al la Klubo, aŭ aĉeti apartajn numerojn, ĉe preskaŭ ĉiu Esperantista Librovendisto, aŭ ĉe la Libroservo de Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Eldonita de : *The Esperanto Publishing Company, Ltd., Anglujo.*

Ĉi-tiu libro de la fama verkisto Usona, tre konata pro liaj romanoj pri Tarzan, ankaŭ en humoro fantazia skribita estas.

La verko pritraktas la mirigegan historion de iu bravega mondulo sur la planedo Marso. Tie li spertas nombron da travivitaĵoj strangaj, ĝis li, pro kompreneble neevitebla amo al marsa princino, ankaŭ iĝas princo de Heliumio, iu lando sur Marso. Post kelkaj jaroj tamen, kiam la morto minacas tutan la vivon sur la planedo, per heroa agado li savas la Marsanojn oferinte sin mem por ili, kaj... retroviĝas sur mondo !

La traduko en tre fluanta lingvo skribita kaj bone zorgita estas. La legado ege faciligata estas per la vere bela kaj bona stilo. Plie la teksto ne almontras erarojn gravajn kontraŭ la gramatiko, krom kelkaj peketoj en la uzado de la korelativoj tiel... kiel, en la uzado de la participo kaj en la adverba uzado de la adjektivoj.

Esperu ni tamen, ke ĉiuj la esperantaj tradukoj el la mondliteraturo estos jam tiel bonaj kiel ĉi-tiu !



ANTWERPEN. — *Flandrema Grupo Esperantista.* — Sukcesegis nia septembra festo ! Tial ni ĉi-tie dankas ege ĉiun el la pli ol ducent partoprenantoj, kaj precipe la multnombran aron de Nederlandanoj.

Vi eble miras pri la multnombreco de la festintoj ? Nu, tio nur klarigebla estas ĉar la festo plenvaloris la viziton ! Ĉu ni ja ne vidis la faman Teatran sekcion Turnhoutan, ĉu ni ne ridegis pro la deklamado de humuristo, ĉu ni ne atente aŭskultis kantiston, ĉu ni ne gajnis amason da fotografaĵoj, kaj... ĉu ni ne dancadis la « Lambeth Walk » ?

Sed ankaŭ ni lernis kelkajn interesaĵojn dum nia vizito al la centra telefonejo kaj poste ni ege admiris la literaturon de niaj propraj verkistoj Flandraj !

Cetere nia festo vere internacia estis ĉar, krom la Holandanoj, ankaŭ ĉeestis unu samideano Ĉeĥa, Pola kaj Bulgara, kun kiuj ni interkonatiĝis.

Pri la Ligkunveno, okazinte en nia ejo, Vi ja trovis la raporton oficialan en la antaŭa numero, ĉu ne, por pruvi al Vi, ke ankaŭ en ĝi oni vere laboris.

En nia grupo mem la sekretario, Sro. J. De Ridder, faris paroladegon pri la Talmudo, pro kio li akiris aplaŭdegon viglan.

Plie ĉiuj la geklubanoj ricevis tradukan taskon, ĉar ni kune klopodos traduki fragmentojn el iuj verkistoj. Por komenci ni elektis parton el « Oorlogsnovellen » de E. Claes. Esperu ni ke ni sukcesos !

Tiam ni havas novaĵon feliĉegan : nia laborema prezidanto, Sro. Th. Van Gindertaelen, la 14-an de Oktobro, deklarata estis kiel « Doktoro pri la Leĝo-scienco » ! Ĉiuj gekunklubanoj liaj ege gratulas lin !

BRUSSEL. — *N. E. L. E.* — La 13-an de oktobro paroladis por nia sekcio S-ano Vogelfang el Ĉekoslovakio. La multaj demandoj de niaj sekcianoj, al kiuj nia eksteranda gasto devis respondi, klare montris la intereson kiu regas pri tiu aktuala temo. La 20-an nia ano H. Boon prelegis, laŭ karakteriza maniero, pri la bonhumora, satira verketo « La Aventuroj de L. R. M. Stultulof la X-a de Fuŝio ». Dum tuta horo la prelegisto amuzis la kunvenon kies aplaŭdojn li certe meritis.

RONSE. — « *La Paca Stelo* ». — Gesamideanoj, Jen ni estas! Ho, ĉu vi dormis ? Ne, ni ne dormis, nek silentis, kontraŭe, ni gra-

ve laboris sed multe okazis. Jen la kialo pro kio ni ne iom pli frue komunikis : Nia grupo oficiale aliĝis al « Flandra Ligo Esperantista ». — Jes, gratulojn diversajn ni ricevis, kontraŭbatalojn ni spertis, unuvorte : « LA » elementoj *restis* kaj pravis kun ni per tiu decido, la gelaborantoj pligrandigis la kuraĝon, la KAPABLAJ grupanoj manifestis fidelecon.

Kaj nun al laboro. — Por aŭ kontraŭ ni, ni duobligu niajn fortojn, kaj « ĉiam antaŭen » restos nia devizo.

Fidelaj gemembroj, vi, kiuj venis sufiĉe regule al niaj semajnaj kunvenoj nun almenaŭ, venu pli regule ol antaŭe, ni restos kune kaj plidikigos niajn rangojn. Interamikeco regos en plena harmonio. Jam de nun la subskribanto petas vin : Faru vian devon. La nuna estraro jam arde laboris kaj kiel pruvo, ni jam tre bone ekkomencis nian vintran laboron, nome per Parolado pri Bulgarujo de S-ano Lektoro KRESTANOV Ivan el Bulgarlando., kiu bone sukcesis kaj ĉi-tie, mi dankas por la ĉeesto de la gesamideanoj el Asper, Gavere, Oudenaarde kaj Zottegem. Jen montro de interhelpado.

La estraro jam planis gravajn decidojn kiujn ni publikigos je tempo. Baldaŭ la nova kurso komenciĝos, ke ĉiu faru sian devon, kunportante UNU novan elementon, kaj ĉiam la rektan vojon ni sekvos.

Lastan vorton al vi gemembroj : fiera mi estas, por via fideleco al « Paca Stelo » kaj pro tio : Dankon, personan kaj koran dankon ! !

G. D. B.

TURNHOUT. — *La Turnhouta Espero.* — Merkredon la 7-an de septembro ni kunvenis en ĝenerala jarkunveno. Nia estimata eksprofesoro Sro Van Doren ĉeestis. Estis diversaj gravaj punktoj je la tagordo, nome jarraporto, raporto pri la kasstato, elekto de nova estraro k. t. p. La raporto de la sekretariino donis klaran resumon de la okazintaĵoj de la pasinta jaro. Ni citu inter alie la konferencojn de Sro Tenebaŭm, kaj fraŭlino Staes, la Baghy vesperon en Arendonk, la rememoron Zamenhof ; plue la diversajn prezentadojn de « Kia Miksaĵo » en Turnhout, Antwerpen, Brugge kaj Brecht, kaj la kursfinofeston en Turnhout kun la prezentado de « Li kiel Ŝi ». La raporto de la kasisto estis ankaŭ klara kaj detala. Ni aŭdis la diversajn enspezojn kaj elspezojn, kaj sciis ke, krom la aĉetoj por la biblioteko restis ankoraŭ io en la kaso. Do ni povis konkludi ke nia juna grupo jam multe realigis, kaj ke ni trapasis prosperan jaron. La elekto de la estraro pruvis ankaŭ ke ĉiuj estis kontentaj, ĉar oni reelektis ĉiujn estraranojn, nur je kelkaj ŝanĝoj de posteno. Por faciligi la laboron oni pligrandigis la estraron je du komitatanoj, kaj per aplaŭdoj Sro Van Doren estis elektata honor-prezidanto. Vere tiun honoron li plene meritas. La prezidanto fermis la kunvenon per alvoko al la kunlaborado de ĉiuj, por la prospero de nia grupo, kaj por la tuta

esperanta movado. Lundon la deknaŭan de septembro Sro Krestanof el Bulgarujo donis interesan konferencon kun lumbildoj en la salonejo de la urbdomo. Ĉeestis gesamideanoj el Geel, Arendonk, Oud Turnhout, kaj samideanino el Denderleeuw. Sro Krestanof paroladis pri la historio, la moroj, la fekundeco de la tero kaj la vidindaĵoj de Bulgarujo, kaj montris al ni kelkajn belegajn bildojn. Ĉiuj atente aŭskultis tiun agrablan kaj instruigan konferencon. Ni dankas Sron Krestanof kaj esperas revidi kaj reaŭdi lin.

ATENTU. — *La batalo por la krucvorto (vidu numeron 3 de Fl. E.) finiĝas je la fino de Novembro ! !*

SOLVO DE PROBLEMO 58.

Man — nuk — miaŭ — mien — neniam — vivad — sakso — human.

Se vi amas min, vi amu ankaŭ mian hundon.

SOLVO DE PROBLEMO 59.

Ne bruligu kandelon de ambaŭ pintoj.

PREMIOJ.

Sro K. Pollet el Aartrijke gajnis la premion de 5 fr. por problemo 58.

Fino V. D. Mast el Antverpeno gajnis la premion de 10 fr. por problemo 59.

NOVAJ PROBLEMOJ.

Por problemo 62 ni forlotos premion de 5 fr. Por problemo 63 unu de 10 Fr. Ensendu la solvo'n sur aparta folio, metu sur ambaŭ nomon kaj adreson kaj ne forgesu glui la konkurskuponojn. La difinoj kun (R) estas radikvortoj. La solvoj estu sendataj antaŭ la 5a de Decembro rekte al Sro *F. Volders, Twee Nethen straat, 46, Antwerpen.*

MAGIA KVADRATO Nr. 62.

	1	2	3	4	5
1					
2					
3					
4					
5					

1. — Parto de jaro. (R)
2. — Kredi ion vera. (R)
3. — Arto esprimi per gestoj pensojn kaj sentojn. (R)
4. — Enpenetri.
5. — Orienta veturilo tirata per homa forto. (R)

DIABOLO ENIGMO. (Nr. 63).

1. — Fundamentaj regularoj de societo.
2. — Kolekto da ŝtonaj aŭ metalaj figuroj.
3. — Alteco de la homa korpo.
4. — Ekkuro en sporta konkurso.
5. — Parto de urbo. (R).
6. — Ĉiela korpo. (R)
7. — Grupo da homoj devenanta de unu sama prapatro. (R)
8. — Kolekto. (R)
9. — Vokalo.
10. — Ludkarto. (R)
11. — Monkonservejo. (R)
12. — Fermita nemiksiĝanta popola klaso. (R)
13. — Difini la valoron de io.
14. — Fortranĉi la seksan glandon.
15. — Severe preciza.
16. — Tre pura senkolora vitro.
17. — Juvelisto. (specialisto).



DUA GRANDA LIBRO-LOTERIO
de Flandra Esperanto - Instituto

Instigite pro la sukceso de la loterio okazinta pasintjare, F. E. I. denove forlotumos 50 tre havindajn premiojn en valoro de entute 1.000 frankoj.
La ĉefpremiojn konsistigas la plej beraj kaj valoraj libroj.
La prezo de unu loto estas nur 1 franko!
Kaptu la okazon por parteĉi vian bibliotekon por eta sumo!

LISTO DE LA PREMIOJ:

1. Originala Verkaro de D-ro Zamenhof, 605 paĝoj. Lukse bindita.
2. Historio de Esperanto. Privat. 2 volumoj. Lukse bindita.
3. Plena Vortaro de Esperanto. 511 paĝoj. Bindita
4. Groot Woordenboek Van Straaten. 688 paĝoj. »
5. Beknopt Woordenboek Van Straaten. »
6. Tra la Labirinto de la E-Gramatiko. Faulhaber. 334 paĝoj. »
7. Stranga Heredaĵo. Luycken. Originala romano »
8. Pro Ištar. Luycken. Originala romano »
9. Palaco de Danĝero. Wagnalls. Trad. el angla »
10. Aŭstralio, lando kaj popolo. Delsudo & Laiho »
11. Abismoj. Forge. Originala romano »
12. Saltego trans' Jarmiloj. Forge. Originala romano »
13. La Leono de Flandrujo. Conscience »
14. Padieter. Timmermans »
15. Vivo de Zamenhof. Privat. Ilustrita.
16. La Vojo Returne. Remarque »
17. La Naiveco de Pastro Brown. Chesterton »
18. Romano pri Afrika Bieno. Schreiner. »
19. Pri la origino de l'Homo. Keith »
20. Jimmie Higgins. Sinclair
21. De Voorzetsels in het Nederl. & in Esp. Degenkamp.
22. La Verbo en Esperanto. Glück & Willems
23. Lingvaj Respondoj. Zamenhof
24. Ponto al la Praktiko. De Jongh & Feenstra
25. Sinjoro Longkruruno. D. Uitterdijk.
26. Murdo en la Orienta Ekspreso. A. Christie
27. La Knaboj de Paŭlo Strato. F. Molnar
28. La Princo kaj Betty. P. G. Wodehouse
29. La Tempo Maŝino & La Lando de la Blinduloj. H. G. Wells
30. Princino de Marso. E. R. Burroughs
31, 32, 33, 34, 35. Per Biciklo al Italujo. K. Šolc
36, 37, 38, 39, 40. «Juna Vivo» Kantaro. 34 kantoj kun muziknotoj.
41, 42, 43, 44, 45. Kia Miksaĵo. V. Dorno. Originala teatraĵeto.
46, 47, 48, 49, 50. Granda bildo de D-ro Zamenhof. Arta eldono 36 — 28 cm. sur dika, glata papero.

Mendu viajn biletojn al F. E. I., Magdalenastraat 29, Kortrijk, antaŭ pagante pere de poŝtĉekkonto no 3268.51.

KUPONO POR LA 62a KONKURSO	KUPONO POR LA 63a KONKURSO

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

DRUKKERIJ

Aŭtomata Presejo

H. BRAEKEVELT

Statiedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.
Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.
Liveras al la diversaj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.
Tel.: 1080.

AANGENAAM LEERBOEK
VOLGENS RECHTSTREEKSCHE METHODE
Overvloedig geïllustreerd

Uiterst geschikt voor zelfstudie.
Bestellen bij F.E.I. Kortrijk
12 fr. portvrij.
Korting aan onze afdeelingen.

Presejo "HOOGER OP"

Vrijheid 101.

Arendonk

Zorgeme elfinita presado.

Favorprezoj por Esperantistoj.

Café Nieuwe Carnot

FRANS NEEFS-D'HELDT

Carnotstraat, 70 — Antwerpen

Plej bonaj trinkaĵoj.
Salonoj por societoj — Malvarmaj manĝaĵoj — Bonega servado.

Ejo de Flandrema Grupo Esperantista
(Sekcio Antwerpen de Fl. L. E.)

ĈU VI JAM LEGIS
la amuzan libron :

La Aventuroj de L. R. M. Stultulof la Xa.

de F. V. DORNO
(La aŭtoro de « Kia Miksaĵo »)

Kion skribis la grava esp-gazetaro ?
Heroldo de Esperanto : « Ĝi estas satiro, iuloke atinganta ĝis grotesko..... Legado certe donos plezuron ».
Sennaciulo : « La verketo entenas sufiĉe por amuzi dum kelkaj horoj ».
Sur Posteno : « Oni legas ĉiam kun agrable-humora sento, ofte kun rido sur la lipoj ».

PREZO : 5 fr.
Mendeble ĉe Flandra Esperanto-Instituto.

Presejo "HOOGER OP" Lavrijsen, Arendonk. Tel. 52